

ANTAŬPAROLO

Lao-cu, antikva ĉina filozofo, estas kredata, ke li vivis en 480-380 jaroj a.K. Lia verko estas nur tiu ĉi libro, kiu konsistas el 81 ĉapitroj da prozo kaj verso. Oni kredas, ke ĝi estis skribita de li por Jin-hsi, doganestro de Hankukuan, kiam li foriris de Ĉinio okcidenten sur nerevenota vojo. Posteuloj kompilis ĝin kaj elfaris en du partojn, la supran kaj malsupran volumojn; de ĉapitro 1 ĝis 37 kaj de 38 ĝis 81. La 1-a ĉapitro komenciĝas per la vorto "Vojo" kaj la malsupra volumo per la vorto "Virtu", kaj oni ĝin nomis "La Libro de Vojo-Virtu". Ĝi enhavas 5328 ĉinajn ideogramojn. Dum diktado supozeble estis misdiktita kaj aperis kelkaj variantoj, sed inter ili ne troviĝas multaj diferencoj. Tamen la ĉina lingvo propre estas izolita lingvo, kaj ĝi konsistas nur el vort-radikoj kaj partikuloj, speciale la teksto de ĝia antikva stilo estas malfacila por kompreni. En du mil jaroj socia tendenco multe ŝanĝiĝis, kaj ĝiaj komprenoj nun estas diversaj inter studentoj. Tamen la opinio de Lao-cu, "Asimiliĝu al naturo per senartefaro", kondukas la homan spiriton al la ekstrema vero de la vivo

kaj la universo. Ĝi donas multe da instruoj al nia kulturo.

De malnovaj jaroj multaj tradukis la libron de Lao-cu, sed multaj el ili jam de la unua ĉapitro miskomprenis kaj erartradukis la tekston. Mia majstro Sŭten INOUE, en sia verko "Nova Studo pri Lao-cu", studis variantajn librojn, kompare korektis, plie li studis anglajn tradukojn de James Legge, Lionel Giles kaj Walter Gorn Old kompare kun sia angla traduko, kaj li indikis iliajn mistradukojn. La aŭtoro de tiu ĉi libro korespondis kun s-ro Sŭten Inoue, kaj iam lin vizitis. Ĉe lia hejmo en Kobe, kaj petis instruon. La aŭtoro kredas, ke lia vidpunkto devas esti la plej korekta, do tie ĉi mi tradukis bazante min sur lia traduko kaj aldonis komentariojn laŭ mia propra vidpunkto. Mi provis traduki jam tri fojojn, sed ankoraŭ mi ne kontentas kun tiu ĉi.

Aŭtuno, 1957

Notoj pri Lao-cu

◆ Pri "Lao" (maljuna) "cu". (majstro), japane "Roŝi", la ĉina historia libro Siki, en la parto de biografio de Lao-cu, diras: Lia familia nomo estas "Li", persona nomo estas "Er" (orelo), lia plumnomo estas Pai-jang, kaj post lia morto oni lin nomis "Tan" (orelkriplulo). Eble li havis karakterizecon ĉe liaj oreloj. Li naskiĝis en Cu-Jen-vilaĝo, Li-Kantono, Ku-gubernio, en la lando Cu. Sed tia stranga geografnomo ne estas konata, ĉar Cu-ĵen (maljusta grandulo), Li (malbona diablo), Ku (malfacila laboro), nur Cu estis vere la regno sur historio, en la epoko de mezo de enlanda milito. ◆ Iu notis, ke kiam Lao-cu mortis (kompreneble li mortis ekster Ĉinio), funebrokunvenantoj estis plorantaj, tie venis la unua disĉiplo, sed li ne ploris kaj nur salutetinte ekforiris, do iu al li riproĉis lian imperinenton, sed li respondis: Lao-cu ne povis influi al popoloj per sia ideo, tial vi ploras, do al mi ne indas profunde riverenci lin. ◆ Sur la monto Tai-ŝan en San-tung-provinco staras monumento de Lao-cu, kiu estas sen epitafio, sed nur natura oblonga ŝtonego. ◆ Iu notis, ke iam Konfucio (Kun-fu-cu) vizitis al

Lao-cu demandi pri etiketo, ĉe lia laborejo-biblioteko, kaj elirinte Konfucio murmuris: Lao-cu estas drako! ♦ Ĉina religio Taoismo apoteozias lin kun dia homo, sed la doktrino estas tute superstiĉa. ♦ Iuj kritikas, ke la teksto Lao-cu ne estas sinteza, iuj partoj estas prozaj kaj aliaj estas poeziaj, kaj tre ofte ripetigas sama temo, tial Lao-cu ne estas reala persono ekzistinta, kaj iuj apokrifis en pliposta tempo. ♦ Aliaj kredas, ke li ne estis ĉina indiĝeno (vidu ĉap.14), sed Mezaziano aŭ Turkestanano, do li foriris okcidenten pasinte Hanku-kuan, okcidentan landlimon. Kaj la dubata signalvorto "I-ho-uei" (Je-ho-vo) nun ankoraŭ estas uzata kiel krisignalo en Sud-Ĉinio inter laboristoj por transporti pezan pakaĵon "je-ho, je-ho". ♦ En Ĉinio estas eldonitaj jenaj komentariaj libroj pri Lao-cu: "Komentarioj de diversaj libroj" (Cu-pen du-ŝi) de Uangpi; "Libro de Ho-ŝang-kung; "Libro de Cuan-i"; "Kai-Juan Libro" de Hsuan-cung, imperiestro de Tang-dinastio; "Lao-cu tao-te ĉing" de Uang-pi, en Uei-dinastio, kaj Su-ŭei en Sung-dinastio; "Lao-cu ko-ĉi kao-i" de Lin si-i en Sung-dinastio; "Tao-te ĉen-ĉing-ĉu de I-teng en Juang-dinastio; Lao-ci-i" de Ciao-ŝih en Ming-dinastio; "Lao-cu ĉang-i" de Tiao-

ting en Cing-dinastio; "Tao-te-ĉing kao-i" de Fi-ŭan en Cing-dinastio; "Lao-cu fu-ĉi de Nahsu-lun en Popolĉinio; "Lao-cu-kao" de Uang Cung-ming en Popolĉinio; "Lao-cu ku-i" de Jang Su-ta en Popolĉinio. ♦ Japanaj klasikaj verkoj pri Lao-cu estas aperigitaj de jenaj personoj: Jun Dadai, Kinransai, Kokaku Kaiho, Mejin Tozaki, Hoko Sigeno, Tadasu Kasai, Ran Ootake, Gen Minakaŭa, Ken Hirose, Acuŝi Oota. Depost Meiĵi-epoko, 1868, aperis tre multe da tipografiaj detalaj libroj. El ili famaj aŭtoroj estas jenaj: Takahiko Ihukube, Iĉiro Kobajaŝi, Unokiĉi Hattori, Hiroŝi Izaŭa, Junun Jamamoto, Njozekan Hasegaŭa, Joŝio Takeuĉi, Sŭten Inoue, Joŝijiro Takasu, Doiĉi Okada, Masao Oniŝi kaj kelkaj kelkaj institutoj de ĉinologoj eldonis komentariajn lekciojn. ♦ La heredinto de la ideo de Lao-cu estis Cuang-cu kaj Lieh-cu. Cuang-cu vivis en jaroj 371 a.K. - 304. El lia verko nun restas 33 volumoj (7 Internaj volumoj, 15 Ekstervolumoj kaj 11 Diversaj volumoj) kun komentarioj de Kuo-hsiang. Poste ĝi estis honorige nomita "Nan-hua ĉing". Lia verko fariĝas el mallongaj eseoj per poeziaj parodoksoj kaj spiritaĵaj paraboloj de panteisma monismo, la sama kun Lao-cu, nome sendiferenca egalo. ♦ Lieh-cu

vivis en ĉ.400 jaroj a.K. Lia verko fariĝas el 8 volumoj nomita "C'ung-hsu-ĉengĉing". Li lernis pri Lao-cu de Jin-hsi, kiu ricevis la aŭtografon de Lao-cu en Hanku-kuan. Ankaŭ Kuo-hsiang kaj aliaj faris komentariojn. Li evoluigis la ideon de Lao-cu per sia opinio de fatalismo. ♦ La libro "C'ai-ken-t'an", kiu estas kolekto de epigramoj de sep saĝuloj en bambuaro, kiuj estis eksoficistoj de l' postperiodo de Han-dinastio, ĉar en 166a jaro okazis partia ribelo, kaj forkurintoj de granda aresto rifuĝis en montaron kaj grupe loĝis kaj ĝuis "Puran parolon", faris ĉ. 550 versaĵojn en la formo de rekordo, temante precipe pri la ideoj de Lao-cu kaj Cŭang-ĉu. ♦ Originala verko "Novelo Roŝi (Lao-cu)" de Kokuseki Oizumi aperis japane en Novembro 1936, el Sŭnĵu-ŝa, eldonejo en Tokio, kaj ankaŭ samtempe "Roŝi to sono ko" (Lao-cu kaj lia filo) el la sama aŭtoro. La aŭtoro estas literaturisto, ruso-japana hibrido. Li bele bildigis la ideon de Lao-cu en tiuj du verkoj.

SUPRA VOLUMO

ĉap.1 La vojo, kiu estas esprimebla...

La vojo,¹⁾ kiu estas esprimebla, ne estas porĉiama vojo.²⁾ La nomo, kiu estas nomebla ne estas porĉiama nomo. Maleston³⁾ nomu komenco de l' ĉielo kaj tero; eston⁴⁾ nomu la patrino de ĉio. Tial volu observi ĝian delikatecon⁵⁾ per ĉiama malesto. Volu observi ĝian elirpoluson⁶⁾ per ĉiama esto. Tiuj ambaŭ estas la samaj, tamen elirinte ili estas nomataj malsame. Same tion oni nomas mistera,⁷⁾ sed tio estas mistero plus mistero, kaj la pordo de delikataĵaro.⁸⁾

Komentario:

La teksto komenciĝas kun forta neado. La vorto "vojo", ĉine "tao" signifas la vojon de etiko aŭ la principon de moralo. Tamen laŭ Lao-cu ĝi signifas: la vero de l'universo; la ekstermo de naturo; aŭ la patrino de ĉio. Ĉio funkcias pere de la eco, kiu estas donita de la vojo. La litero 玄, (ĉine "hsuan") "nigra, mistera" estas reprezenta adjektivo por la opinio de Lao-cu.

Pied-Notoj:

- 1) La vojo - substanca korpo de l'universo. La ideogramo 道 signifas substantive "vojo"-n, verbe "diri".
- 2) porĉiama nomo - funkcio de l'universo.

- 3) malesto - nenieco.
- 4) esto - ekzisteco.
- 5) delikateco - de la vojo, kvintesenca.
- 6) elirpoluso - elira ekstremo de ĉiuj objektoj, demarkacio.
- 7) mistera - eksperta, virtuoza, plus-kvamperfekto esotera.
- 8) la pordo de delikataĵaro - elirejo de ĉiuj fenomenoj, kvintesenca pordo.

ĉap.2 Kvankam sub la ĉielo...

Kvankam sub la ĉielo¹⁾ ĉiuj konas, ke beleco estas bela, sed tia estas nur malbona. Ĉiuj konas, ke boneco estas bona, sed tia estas nur ne bona. Tial esto kaj malesto kunnaskiĝas, malfacileco kaj facileco kunfariĝas; longeco kaj mallongeco kunformiĝas; alteco kaj malalteco kunkliniĝas; sono kaj voĉo kunharmonias; "antaŭ" kaj "post" kunseriiĝas. Pro tio sanktulo²⁾ pozicias en la afero de nenion-farado³⁾ kaj agas ne parolan instruon. Ĉio funkcias, sed ne rezignas; produktas, sed ne posedas; faras sed ne dependas; sukcesas, sed ne situas. Jen, nur li ne situas, pro tio lia merito ne foriras.

Komentario:

Tiu ĉi ĉapitro montras korelativan kom-

paron inter la vivadoj de la filozofoj de la vojo kaj tiuj de senkonsciaj vulgareuloj. Ĝi proklamas internan vivadon bazigantan sur la vojo, mezurante per infinita skalo, ke la universo funkcias senstrike, produktas ĉion, sed ne private posedas.

P.N.

- 1) sub la ĉielo - tutmondo.
- 2) sanktulo - ideale perfekta persono imagita de Lao-cu.
- 3) nenion-farado - sen artefaro laŭ naturo.

ĉap.3 Se oni ne ŝatus saĝecon...

Se oni ne ŝatus saĝecon, oni popolon ne kontestigus; se oni ne respektus malfacile obteneban trezoron, oni ne igus popolon fari ŝtelon; se oni ne vidigus dezirindan, oni ne igus popolon konfuzi la koron. Pro tio la regado de sanktulo vakantigas ĝian koron. Kaj plenigas ĝian ventron; do malfortigas ĝian intencon, kaj fortigas ĝian ostaron; ĉiam lasu popolon senscia kaj senvola, do la intelektulon igas ne fari kuraĝeme! Se oni farus neartefaron,¹⁾ do povas esti nenio ne regebla.

Komentario:

Konkreta demonstracio de la praktiko de regado kun nenion-farado.

P.N.

1) fari neartefaron - nenion-farado

ĉap.4 La vojo estas amorfa...

La vojo estas amorfa,¹⁾ kaj por uzi ĝin ne elĉerpiĝas ĝisfunde. Ja abisme ĝi estas kvazaŭ origino de ĉio. Ĝi frakasas sian akrecon, kaj solvas sian komplikon; ĝi harmoniigas sian lumon, kaj asimilu sin kun polvoj, ja plenplene. Ĝi mem²⁾ ne konas, kies ido ĝi estas. Probable de antaŭ la kreinto.

Komentario:

La kreinto estas aposteriora kreitaĵo fare de homaro. "Harmoniigu sian lumon, kaj asimilu sin kun polvoj" estas fama frazo kiel etika aforismo, ke humiliĝu, sed ne obeu sklavece. (vidu ĉap.56) Alivorte, "moderigu vian lumon de virto kaj ne distingigu de populara vulgareco, sed ne asimiliĝu kun tiuj, kaj tenadu la vojon".

P.N.

- 1) amorfa - indifinita aŭ nihila.
- 2) ĝi mem - la vojo mem.

ĉap.5 Cŭ la ĉielo kaj tero estas tiel...

Cŭ la ĉielo kaj tero estas tiel nehumana, ke ĝi faras ĉion pajla hundo? Cŭ sanktulo estas tiel nehumana, ke li fari ĉiujn homojn pajlaj hundoj?¹⁾ Inter la ĉielo kaj la tero ja kvazaŭ fairo-blovilo. Ĝi estas senenhava, sed ne estas elĉerpebla; ju plu moviĝas, des pli elblovas. Plimulte parolante oni ofte embarasas. Ne estas pli bone ol gardi neŭtrecon.

Komentario:

Ironia paradokso, kiu prezentas la veron de naturo al homaro. Ĝi samtempe avertas pri konduto de homvivo.

P.N.

- 1) pajla hundo - pupo, marioneto por diservo.

ĉap.6 Dio de valo ne mortas...

Dio de valo¹⁾ ne mortas; ĝin nomu misterulino²⁾; la pordo de misterulino, tion nomu la radiko de l' ĉielo³⁾ kaj tero. Sĭ longlonge ekzistas, kaj ĝin uzas, sed ne laciĝas.

Komentario:

Simboligo de la vojo per vakanta valo kaj ina organo, kiu montras senfinan heredon de generado.

P.N.

- 1) Dio de valo - eĥo.
- 2) misterulino - patrino de ĉio.
- 3) la radiko de ĉielo kaj tero - pordo de ino, ina seksorgano.

ĉap.7 Ĉielo estas longedaŭra...

La ĉielo estas longedaŭra, kaj la tero estas eterna. Kial ili povas esti longa kaj eterna? Ĉar ili ne naskiĝis spontane. Tial ili povas longvivadi. Pro tio sanktulo sindetene ne kontestas, malgraŭ tio anticipas; ignoras sin, malgraŭ tio ekzistadas; ĉu tio ne devenas de senpartieco? Tial la memeco¹⁾ povas fariĝi.

Komentario:

Agordiĝu kun la naturo laŭ la senmemeco. kiel dirite pri la rimedo por longa vivo, "Anstataŭ iri per veturilo, iru piede; anstataŭ manĝi viandon, manĝu grenon malrapide."

P.N.

- 1) memeco - privateco, individueco kontraŭ abnegacio.

ĉap.8 Supera bono estas kvazaŭ akvo...

Supera bono¹⁾ estas kvazaŭ akvo; akvo bone utilas por ĉio kaj ne kontestas. Akvo pozicias la lokon, kiun ĉiuj malamas, tial ĝi estas proksima al la vojo. Ĝi bone sidas teron; ĝia koro bone faras abismon; ĝia dono faras filantropion. Ĝia parolo faras fidindecon; ĝia politiko bone regas; ĝia klopodo bone kapablas; ĝi moviĝas en bona tempo. Jen nur ĝi ne kontestas, tial ĝi estas senklupa.

Komentario:

La sintenado de sanktulo estas supera bono, kaj ties karakterizo similas al akvo. La libro "Lunju" de Konfucio instruas pri politiko: "La politikon ne lasu al popolo scii, sed lasu ilin obei." Fi! Konfucio perdis ĉion pro tiu ĉi unu frazo kvazaŭ la malsaĝa hundo en Ezopa fabelo (vidu ĉap.58, 59, 60, 65, 75 pri politiko kaj regado).

P.N.

- 1) supera bono - la plej alta bono - sanktulo.

ĉap.9 Tenante ujon enplenigi akvon...

Tenante ujon, enplenigi akvon ne estas pli bone ol ĉesi. Raspinte ĝin, akriĝi ne eblas longe konservadi la akrecon. Se oro kaj juvelo pleniĝas en la domo, neniuj povas gardadi. Se iu arogantas sian riĉecon kaj altrangecon, li mem-kaŭzus domaĝon; merito fariĝis, famo plenumiĝis, tiam li mem retiriĝu; ho, vere tio estas la vojo de l' ĉielo!

Komentario:

Ol postuli pli, preferu ne perdi vian jam akirintan.

ĉap.10 Aŭ se centrigante cerbon...

Aŭ se centrigante cerbon kaj ĉirkaŭbrakante la unuon¹⁾ senforlase (vidu ĉap.54); aŭ se centrigante menson, mildiĝas kiel suĉinfano; aŭ se ellavante sian deziron kaj bone rigardas, se povas trovi sendifekta; aŭ se amante popolon, kaj regante landon, povas esti nenionfara; aŭ se koro moviĝante, povas esti negative diskreta;²⁾ aŭ se klare ĉion sciante, povas esti sensciema. Kvankam produktas kaj rezervas, produktante ne

posedas. Farante ne dependas; estriĝante ne mastrumas. Tion ĉi nomu eksperta virto.

Komentario:

Supraj ses frazoj ekde "aŭ" montras kondiĉojn por posedadi perfektan virton, virtuozecon aŭ misterecon.

P.N.

- 1) unuo - la vojo (vidu ĉap.54).
- 2) negative diskreta - esti ineca.

ĉap.11 Tridek radradioj komunas...

Tridek radradioj komunas unu aksingon: ĉe ties nenieco estas utileco de rado. Knedi argilon kaj fari ujon; ĉe ties senenhavo estas utileco de ujo. Elĉizi pordan fenestron por fari ĉambron; ĉe ties senenhavo estas utileco de ĉambro. Tial la profito de havo venas de la utileco de senenhavo.

Komentario:

Ekzisto kaj malekzisto ĉiam interrilatiĝas en la universo.

ĉap.12 Belaj koloroj blindigas...

Belaj koloroj blindigas homajn okulojn; muziksonoj surdigas homajn orelojn; bongustoj erarigas homajn buŝojn; rajdado kaj ĉasado frenezigas homajn korojn; malfacile akireblaj trezoroj rompigas homajn agojn. Pro tio sanktulo kulturas sian internon, sed ne nur okulojn. Tial for de ili, (koloro, sono kaj gusto) kaj prenas tiun ĉi vojon.

Komentario:

Forigi patoson kaj aliĝi al logoso estas rekomendo de Lao-cu.

ĉap. 13 Favoro kaj ofendo...

Favoro kaj ofendo estas kvazaŭ miroj; altrangiĝo estas malsano kvazaŭ al ni mem. Kion oni diras favoro kaj ofendo? Favoro estas supra kaj ofendo estas malsupra; ricevi ĝin estas kvazaŭ miri; perdi ĝin ankaŭ estas kvazaŭ miri. Ĉi tion oni diras, ke favoro kaj ofendo estas kvazaŭ miroj. Kion oni diras, ke altrangiĝo estas kvazaŭ malsaneco al ni mem? Ĉar ni havas malsanegon; pro ke ni havas la korpon, kaj se ni

ne havus la korpon, kian malsanon ni povus havi? Tial pro tiu, kiu altrangiĝas per sia korpo, kaj al tiu, kiu prizorgas la mondon, nome oni povus aligi la mondon. Tiu, kiu prizorgas la mondon per amo, nome al tiu oni povas komisi la mondon.

Komentario:

Se iu estas abnegacia, li nepre estas sidonema kaj altruisma por la mondo. Se oni sin respektus malgraŭ sia altrangeco, favoro kaj ofendo ne povas sklavigi lin. El la cigna poemo de japana mortigita kido D. Kotoku: "Vivi kaj morti, kvazaŭ la longnokta sonĝo; gloro kaj ofendo, kvazaŭ kosmaj polvoj!"

ĉap.14 Kvankam vi rigardas ĝin...

Kvankam vi rigardas ĝin, sed ne vidas; tion nomu "senforma". Kvankam vi aŭskultas ĝin, sed ne aŭdas; tion nomu "senvoĉo". Kvankam vi pensas ĝin, sed ne vidas; tion nomu "mikro".¹⁾ Tiujn tri erojn²⁾ ne eblas rezoni, tial ili unuigas intermiskiginte, ĝi ne estis klara en pratempo, ĝi ne estas malklara en nuntempo; ŝnurtorde longlonga, do oni ne povas nomi; ĝi

revenas en maleston; tion nomu senstata stato, aŭ senfenomena fenomeno. Tion nomu dubinda; renkont-venigante oni ne vidas ĝian kapon; sekvante oni ne vidas ĝian postaĵon. Prenu antikvan vojon kaj konduku nunan eston,³⁾ do oni povas scii antikvan komencon, tion nomu ŝnurego de l' vojo.⁴⁾

Komentario:

Tri ideogramoj en la tri unuaj frazoj ĉine "i" 夷 (senforma), "he" 希 (senvoĉo) kaj "ŭei" 微 (mikro), nome "I-he-ŭei" prononce similas al "Jehovo"; do iuj opinias, ke Lao-cu tie ĉi kaŝas la signalvorton de Kabbla-sekto de Hebreismo "Jod-he-vau". Tamen tio ne povus demonstraciigi; tio ĉi montras nur kvalifikajn epitetojn de la vojo.

P.N.

- 1) mikro - eksreme eta.
- 2) tiuj tri eroj - epitetoj por la vojo.
- 3) nuna esto - fakto.
- 4) ŝnurego de l' vojo - la ora regulo.

ĉap.15 Antikva inda esti virtulo...

Antikva inda esti virtulo estis delikate kvintesence virtuoza, kaj nescieble profunda, jen nur nesciebla. Tial se devige farus adjektivon, ja kvazaŭ vadi riveron en vintro prokrasteme; ja modesteme kvazaŭ timi al najbaroj; ja prudente ĝi humilas kvazaŭ gasto, ja diskrete kvazaŭ glacio eksolviĝas; ja plumpa ĝi estas kvazaŭ la ŝtupo¹⁾; ja vakua ĝi kvazaŭ valo; ja ĥaosa ĝi kvazaŭ malpurakvo; kiu povus malpuriĝante kviete puriĝi iom post iom? Kiu povus trankviliĝante moviĝante naski ĝin iom post iom? Tenanto de tiu ĉi vojo ne volas pleniĝi. Jen, nur ne pleniĝas, tial ĝi, kvankam malnovrompiĝus, ĝi ne faras denove.

Komenrario:

Ideala virtulo ĉiam estas humilema kaj modesta, kaj li tute ne trudemas aŭ pretendemas kiel supraj ekzemploj.

P.N.

- 1) ŝtupo - naiva homo (vidu ĉap. 18, 19, 28, 32, 37, 57)